

## TEATRETO DE RELIGIO

(Mt 6,1-18)

NOTU BONE: La mll <Z.> en la  
citaĵo ĉe versegoj estas indiko de  
transskribo el LA SANKTA BIBLIO  
tradukita de Zamenhof, eld. Biblia  
Societo, Londono Edinburgo, 1984

### Profesiuloj pri sanktaĵoj.

Post kontraŭstarigo de sia instruo al la Mosea doktrino ("*... sed mi diras al vi...*" Mt 5,22), Jesuo ekkritikas la religian praktikadon, kiun skribistoj kaj farizeoj pretendis kontrabandi kiel esprimon de la dia volo (Mt 15,3).

La tri kolonoj sur kiuj baziĝis la juda religieco estis ~~la~~ *almozo*, ~~la~~ *preĝado* kaj ~~la~~ *fasto* (Tb 12,8). Tiujn ĉi religiajn praktikadojn subtenis la skribistoj kaj zorgoplene plenumis farizeoj, kiuj, per sia vivstilo, opiniis esti ~~kiel~~ ekzemplo por la popolo.

Laŭ Jesuo, la Homo-Dio, kiu fariĝis je l' servo de la homaro, ne ekzemplo sed servo estas la sinteno, distinganta la kredanton (Mt 20,25-28). La ekzemplodona individuo montras siajn virtojn, por ke la aliuloj strebu tiujn celi: tio kredigas al li, esti supera al tiuj por kiuj li estas la ekzemplo (Lk 18,11-12).

Jesuo instruas, ke la posedataj kvalitoj kaj virtoj ne estas elmontrendaj, sed devas utili al kiuj ilin bezonas. Dum ekzemplo distancigas la donanton de la ricevanto, la servo forigas distancojn kaj egaligas homojn.

La deziro doni ekzemplon povas instigi individuon alprenimodelojn de religia sinteno, ne respondantaj al propra vivo, sed apartenantaj al la *sablono* de piulo.

Per sia instruado Jesuo malkonstruas tiujn modelojn deekzempla religieco kaj, sen duonaj mezuroj, difinas *hipokrituloj*, la aplikantojn (Mt 6,2.5.16). Unuafoje aperas en la Evangelio de Mateo la vorto *hipokritulo* (gr. *hypokritês*), eĉ dekkvarfoje uzata fare de la evangelisto, kontraŭ tri de Luko kaj nur unu ĉe Marko. Tiam per tiu nomo oni indikis la rolanton, nome la *komediiston*. Jesuo ĉiam uzis tiun titolon, kiam Li sin turnis al skribistoj kaj Farizeoj (Mt 23,13-15).

Veraj profesiuloj pri sanktaĵoj, skribistoj kaj Farizeoj, per elmontrado de propra kompato, manifestis (Mt 6,1-18 36) sian superecan sintenon al cetera popolo, pro la nesatigebla admirbezono flanke de homoj.

Sed Kristo ne lasas sin trompi de l' ŝajno.

Laŭ Jesuo, kiuj malavaras je almozo *“por havi gloron ĉe homoj”* (Mt 6,2<Z>) estas nenio alia ol komediistoj.

Nenio pli maldecas ol parado de farata bono.

Almozo, samkiel ĉiu formo de profitocela helpo, kiam ĝi gloras la faranton, estas ĉiam humiliga por la ricevanto, kaj kiam ĝi estas reklamita utilas nur por plifirmigi propran reputacion de sankteco.

Kiuj ekspluatas aliulajn bezonojn por diskonigadi tra la mondo kiom grandas iliaj boneco kaj malavareco, estas nuraj komediistoj, kiuj sentas sin jam rekompencataj per la estigita admiro. Laŭ Jesuo ili eĉ ne kultas la Sinjoron, sed dezirante *“havi gloron ĉe homoj”* (Mt 6,2<Z>), substituiĝas al Dio, direktante al si mem la gloron, kiu devas nur celi al la Patro *“... kiu estas en la ĉielo”* (Mt 5,16 <Z>).

Al la almozo, juda praktikado estimata ege plenmerita ĉe Dio (Tb 4,11; Pr 19,17), Jesuo kontraŭstarigas la kunpartigon de la havaĵoj (Mt 19,21).

Sed doni almozon signifas intermeti distancon kaj subordigon inter faranto kaj ricevanto, la kunpartigo nuligas tiun distancon kaj starigas rilaton inter egaluloj: ne aĵoj donendas al la malriĉuloj, sed ĉefe si mem (Mt 14,13-21). Kiu vere amas deziras ke la aliulo havu la samajn posedatajn aĵojn kaj tio ne eblas per almozo, sed nur per kunpartigo de tio, kio oni estas kaj kion oni havas.

Atendante ke la komunumo de Mateo akiru plenajn komprenon kaj akcepton de la Jesua mesaĝo, pasante de la juda praktikado de almozo al tiu kristana de kunpartigo (Mt 5,3), la evangelisto invitas almozdoni ege diskrete. (Mt 6,3-4).

### Fatala altiro (Mt 6,1-18 37)

Centre de la Jesua starpunkto pri la tri judaj religiaj praktikadoj, Mateo lokigas la plej gravan: la preĝadon.

Kiel Li jam faris pri almozo, Jesuo ridindigas tiujn, kiuj postulas diskonadon de sia devoteco, por altiri admiron de homoj.

Rabena maksimumo asertis, ke *“en la mondo estas dek partoj da hipokriteco: naŭ el ili troviĝas en Jerusalemo”* (Ester Rabbà, I, 3-85b). Koncentrado de tiom da hipokriteco en Jerusalemo sekvis el la fakto, ke en la sankta urbo staris la Templo de la Sinjoro.

La Templon, kiun la Sinjoro ne deziris (2 Sam 7, 5-7) konstruis Salomono kiel podio de sia senbrida megalomanio (I Reĝoj 6), punlaborigante tridekmil virojn *“el la tuta Izraelo”* (I Reĝoj 5,13<Z.>). Bruligita de Babilonanoj (II Reĝoj 25,8-17) kaj parte rekonstruita dum la

epoko de Ezra (Ezra 3) la Templo akiris novan brilon sub Herodola Granda, kaj estis la plej impona religejo de la antikveco.

Laŭ Jesuo la Jerusalema templo, kiel ĉiu loko sankta taksita nura ŝajno kaj malmulte da esenco estas samkiel figarbo foli plena sed fruktosena (Mt 21,19).

Sed sanktejoj neeviteble altiras la piulojn, kiuj tiujn utiligas kiel teatrojn, en kiuj sian devotecon eblas paradi. Pro tio, kiam al siaj disĉiploj devis montri la pli adekvatan lokon por preĝado, Jesuo tute malatentas tiujn kultejojn (Johano 4,23), kiujn la religiaj aŭtoritatoj igis rezistajn kaj nepenetreblajn por la Spirito de l' Sinjoro, kaj anstataŭe konsilas preĝi ĉe la plej kaŝita hejmo-parto: tiu groto utiligata kiel provizejo. (Mt 6,6).

Jesuo, kiun la evangeliisto nur dufoje prezentas preĝanta (Mt 14,23; 26,36), donas al siaj disĉiploj ankaŭ kelkajn indikojn pri la preĝmaniero.

Preĝo, laŭ Jesuo, estas esprimo de fido en la Patro.

Pli granda estas la fido en la Sinjoro, malpli da formuloj kaj vortoj preĝo bezonas. Male, kiam fido malmultas, pli da vortoj necesas (Mt 6,1-18 38).

Tiujn, kiuj opinias sian fidon aŭ sian devotecon esprimi per multobligado de preĝvortoj, Jesuo komunigas kun la idolanoj. Tiuj longdaŭraj preĝoj, kiuj ŝajnas al homoj konsiderinda ekzemplo de devoteco, laŭ Jesuo estas kiel la galimatio de paganoj. *"Kaj dum via preĝado, ne vante ripetadu, kiel la paganoj; ĉar ili supozas ke ili estos aŭskultitaj pro sia mulvorteco"* (Mt 6,7; Is 1,15 <Z.>).

La vortoj de Jesuo eble memorigis al la aŭskultantoj konatan epizodon rakontitan en la Unua Libro de la Reĝoj, kiam Elia primokas la profetojn de Baalo kaj iliajn preĝojn, kiuj restis ne elaŭditaj: *"Kriu per laŭta voĉo, ĉar li estas dio; eble li havas interparoladon, eble li foriris, aŭ eble li vojaĝas; eble li dormas, li do vekigis"* (1 Reĝoj 18,27 <Z.>).

Jesuo konstatas, ke multaj sin turnas al la Sinjoro ĝuste kiel faras paganoj al siaj dioj, supozante necese memorigi al la Sinjoro kion Li devas fari (*"Rememoru vian komunumon, kiun vi aĉetis en la tempo antikva ..."* Psalmaro, 74,2.8 <Z.>) kriante siajn petojn al dio surda kaj nesentema. (*"Al Vi, Eternulo, mi vokas, Mia Roko, ne silentu al mi"* Psalmaro, 28,1; 86,3 <Z.>)

Arogante, la homoj, eble taksantaj sin pli kompatemaj ol sia Dio, klopodas konvinki la Sinjoron aperi kiel ili samgrade kompatata kaj indulgata (*"Estu kompatema kun ili, ho Sinjoro, kaj protektu ilin!"* (Tobia 8,17 >)

Sed por Jesuo *"via Patro scias, kion vi bezonas, antaŭ ol vi petas de Li"* (Mt 6,8 <Z.>). Pro tio ke la Patro scias kion la homoj bezonas, senutila estas ĉia peto.

Kiam certas, ke la Patro *scias*, kaj la sperto instruas, ke la Sinjoro ĉion transformas en bonon (Rm 8,28) kaj zorgas ankaŭ pri la vivaspektoj minimumaj aŭ nesignifaj (Mt, 10,30-31), indas nek peti nek eĉ informi, sed transformi la fidon al li en daŭran dankon (Mt 11,25).

Mt 6 1 - 18

### Superstiĉo kaj fasto

Laste Jesuo pritraktas la devotecan faston, kutimon, kiu diferencigas Farizeojn kaj piulojn disde la cetera popolo (Mt 9,14).

La fasto estiĝas en la helena medio kiel sekvo de superstiĉo: estis opinio, ke kaze de funebro la dajmonoj kaŭzintaj la morton, povus havi povon sur la familiano de la mortinto dum ilia funebra manĝo.

Tial, dum la funebra tranokto, oni fastis ĝis kiam la animo de la mortinto vagadis proksime, ĉar daŭre ĉeestis la danĝero de dajmoneca infekto.

Hebreoj heredis tian kutimon el la kanaana kulto de la mortintoj, sed limigis ĝin po unu tago jare, tiu de la pekliberiĝo de la tuta popolo (Lv 23,32).

Malgraŭ daŭre kontraŭata de profetoj, la fastkutimo fariĝis distingilo por Judoj, kiuj libervole fastadis po du tagoj semajne, ĵaŭde kaj lunde, memore de la iro de Moseo supren kaj malsupren de la monto Sinajo.

Laŭ Jesuo, la fastantoj estas komediistoj kiuj misfiguriĝas por paradi (Mt 6,16) antaŭ la okuloj de la homoj kaj de la Sinjoro ("*Kial ni fastas, kaj Vi ne vidas?...*", Jesaja, 58,3<Z.>) Agorde kun la profetoj, Jesuo instruas, ke la Patro ne petas siajn filojn fasti, sed "*dividi la panon kun la malsatulo*" (Is 58,7; Mt 25,35).

La Filo de Dio fariĝas pano por la homaro (Mt 26,26), por ke kiuj lin akceptas kaj fariĝas pano por la aliuloj, mem iĝu filoj de la ununura Patro.

La vivpleno, kiun la Patro transdonas al ili, malkongruas al ĉiu formo de humiliĝo: pro tio Jesuo neniam devotece malsatiĝis kaj neniam petis siajn disciplojn tion fari (Mt 9,15). [1]

[1]

1 La granda bonŝanco, kiun havis la fato-kutimo ene de ia kristana spiritualeco, ne ŝuldiĝas al la instruado de Jesuo sed al la aldono, kiun anonima kopiisto enmetis en la Evangelion de Marko dum la unuaj jarcentoj. Al la eldiro de Jesuo: "*...Ĉi tiu speco [de dajmonoj] neniel povas eliri, krom per preĝado*"(Mc 9,29<Z.>) li aldonis "*kaj fastado*". Ne nur: la tuta versaĵo enmetiĝis en la Evangelion de Mateo post la versego 20-a de la ĉapitro 17-a.

Dum Mateo malvidebligas tiujn judajn kutimojn de sia komunumo, formatante ilin en la internan medion de la kredanto, en la *Evangelio de Tomaso* la tri kolonoj de la hebrea spiriteco estos draste disbatitaj: "Se vi fastos, el tio originos peko; se vi preĝos, vi estos kondamnitaj; se vi almozon donos, via spirito ricevos malutilon"(14), reeĥante la denuncon de la profetoj pri la neutilo kaj damaĝo de la religiaj kutimoj.

*Por kio Mi bezonas vian multegon da  
Buĉferoj? diras la Eternulo;  
Mi trosatiĝis de la bruloferoj de ŝafoj  
Kaj de la sebo de grasigitaj brutoj,  
Kaj la sango de bovoj kaj ŝafidoj kaj  
Kaproj Mi ne deziras.  
Kiam vi venas, por aperi antaŭ Mia  
Visaĝo, kiu postulas tion de viaj manoj,  
Ke vi paŝu sur Mian korton ?  
Ne plu alportu hipokritajn donacojn ;  
La incensado estas  
Abomenaĵo por Mi ; monatkomencon,  
sabaton kaj kunvokon de kunvenoj  
Mi ne toleras – krimo kaj sankta kunveno!  
Viajn monatkomencojn kaj festojn  
Mia animo malamas;  
ili fariĝis por Mi ŝarĝo,  
tedis al Mi porti ilin.  
Kiam vi etendas viajn manojn,  
Mi kaŝas antaŭ vi miajn okulojn;  
eĉ kiam vi multe preĝas,  
Mi ne aŭskultas.  
(Jesaia 1, 11 – 15 <Z.>)*